

1/2018

Januaro  
Februaro

ISSN 0032-2431

# Pola Esperantisto

## Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ Konsiloj por bona sano
- ★ Pola Esperanto-Kongreso en Zabrze
- ★ Venu al Esperantaj Tagoj de Krakovo

## **Pola Esperantisto**

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

## **Eldonanto**

Pola Esperanto-Asocio  
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a  
00-159 Warszawa  
<http://www.esperanto.pl>

## **Ĉefredaktoro**

Robert Kamiński, [rk-lodzo@wp.pl](mailto:rk-lodzo@wp.pl)

## **Kunlaboro**

T. Nemere, M. Tatara,  
A. Wilkus,

## **ABONOJ**

La abono por 2018 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 50 zlotoj  
eksterlando - 20 eŭroj

Cifereca (pdf)

Pollando - 25 zlotoj  
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002  
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu  
adreso estu sendata la revuo.

## **ATENTO**

Abonoj per eŭroj validas post aldono  
de 5 euroj por la bankaj kostoj.

Polan Esperantiston eblas aboni per  
Konto de PEA en UEA: [peaa-v](mailto:peaa-v);

Detaloj troviĝas ĉe:

[http://www.uea.org/alighoj/pag\\_manieroj.html](http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html)

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

## **Estraro de PEA**

Aleksander Zdechlik - prezidanto  
Teruo Matsumoto - vicprezidanto  
Robert Kamiński - sekretario  
Alina Mozer - kasisto  
Agnieszka Mozer - estrarano  
Marek Mazurkiewicz - estrarano

## **Ĉefdelegito de UEA**

Stanisław Mandrak:  
[stanislaw.mandrak@gmail.com](mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com)

## **Peranto de UEA**

Jan Skonieczka: [jaskon@op.pl](mailto:jaskon@op.pl),

Pri la skribitaj artikoloj  
respondecas  
la aŭtoroj mem.  
Ricevitajn manuskriptojn  
oni ne resendadas.  
La redakcio rezervas al si  
la rajton mallongigi  
kaj korekti la tekstojn.  
Represo kaj tradukoj nur  
kun indiko pri la fonto



**Pola Esperanto-Asocio**  
Polski Związek Esperantystów

## Enhavo

Redaktoraj vortoj .....	2
Estraro informas	
Aliĝu al la 37- a Pola Esperanto-Kongreso okazonta en Zabrze .....	2
Eventoj	
<i>Krystyna Zgud</i> , Vojaĝoj de niaj esperantistoj .....	4
Mojose	
<i>www.pej.pl</i> , PEJ-semajnfino en Varsovio .....	5
<i>Tobiasz Kubisiowski</i> , Fotokonkurso por la jubilea jaro de PEJ .....	8
Raportoj, rakontoj	
<i>Andreo Bach</i> , La homo, kiu savis historion .....	8
Vizitindaj lokoj	
<i>Jan Szałowski</i> , Antaŭ 1000 jaroj .....	10
Pri kio ni aŭdas	
<i>Adam Wilkus</i> , Konsiloj por bona sano .....	14
<i>Wiesław Stanicki</i> , Esperanto en la “Universitato de la tria aĝo” .....	16
Homoj	
<i>Zbigniew Kornicki</i> , Pri Paweł Janowczyk .....	19
Lingvosciencia angulo	
<i>Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko</i> , “La” – bazaj reguloj – parto 1 .....	21
<i>Angora</i> , La eŭska miraklo .....	23
Literaturaĵoj	
Pri Rivero Vistulo .....	24
Saĝulaj pensoj	
<i>Observanto</i> , Ni Esperantistoj .....	26
Leterkesto	
<i>Magdalena Tatara</i> , Venu al Esperantaj Tagoj de Krakovo .....	27
<i>PEA en Szczecin</i> , Venu printempe al nordokcidenta Pollando! .....	27
<i>Przemysław Wierzbowski</i> , La urbo Bjalistoko helpas eldoni Esperantlingvan libron .....	27
<i>Stanisław Mandrak</i> , Jam 40 jarojn esperantistoj ripozas en Mileno .....	28
<i>Dominique Baron</i> , Poŝtkarta vidigo de nia tutmondeco - se vi reagos! ..	28
<i>Renato Corsetti</i> , Itala Esperanta kongreso .....	29
Kalendaro	29
Oni eldonis	
<i>Bożena Wierzbicka</i> , Recenzo de la libro „Zamenhof en Varsovio” .....	31
Nia fotogalerio	34

## Redaktoraj vortoj

### Estimataj legantoj

Post longa paŭzo, mi sukcesis fini la unuan ĉijaran numeron de Pola Esperantisto. Multaj neatenditaj okupoj malhelpis al mi prepari ĉion pli frue. Mi promesas rapidigi laborojn ĉe la sekvonta numero kaj aperigi ĝin ĝustatempe.

En la nuna numero ni prezentas artikolon pri instruado de Esperanto en “Universitatoj de Tria Aĝo” (UTA). La aŭtoro prezentas diversajn argumentojn, kial valoras instrui internacian lingvon en tiu ĉi organizaĵo. Ĝenerale, la artikolo estas dediĉita al neesperantistoj, tamen, estas bone rememorigi al ni pri bona influo de la lernado sur homoj kvindek aŭ sesdekjaraj. Oni ankaŭ povas uzi tiujn argumentojn dum varbado al Esperanto. Ni proponu al estraranoj de la universitatoj enkonduki instruadon de Esperanto. Kuraĝu mem gvidi kurson en UTA en sia urbo. Nia E-movado maljuniĝas, malkreskas kaj ĉiu nova esperantisto estas por ĝi tre grava.

Vintro jam finiĝis, tamen, pri sia sanstato oni ĉiam valoras zorgi. Adam Wilkus, en sia artikolo, prezentas al ni kelkajn konsilojn, kiamaniere zorgi pri la bona sano. En la ĉapitro *Vizitindaj lokoj* Jan Szałowski invitas nin al Supra Luzacio, malmulte konata najbara regiono en Germanio. Legu ankaŭ interesan recenzon pri la libro de Roman Dobrzyński „Zamenhof en Varsovio”.

Agrablan legadon

*Robert Kamiński*

## Estraro informas

### Aliĝu al la 37- a Pola Esperanto-Kongreso okazonta en Zabrze en la tagoj 26-28.05.2018

Sendu plenumitan aliĝilon al la 37-a Pola Esperanto-Kongreso (koncernas aliĝintojn, kiuj ne havas eblecon sendi aliĝilon rete) al Pola Esperanto Asocio, Filio en Gliwice, skr. poczt. 21, 44-101 Gliwice 1.

Pollando. Elektronikan aliĝilon al la 37-a PEK sendu al: aleksander.zdechlik@gmail.com

Polaj partoprenantoj antaŭpagos per bankokonto 90 2130 0004 2001 0558 6110 0018 de PEA aŭ al la adreso: Polski Związek Esperantystów, Zarząd Główny, ul. gen. W. Andersa 37/59a, 00-159 Warszawa (kun aldono „Kongreso Zabrze 2018”).

Partoprenu en subteraj ekskursoj - unua la 26-an de majo kaj dua la 27-an de majo.

#### Prezoj en zlotoj

	simpła prezo	rabatita prezo
aliĝkoto		35,00
subtera ekskurso la 26-an de majo	43,00	39,00
subtera ekskurso la 27-an de majo	49,00	43,00
unu tranokto		45,00

(rabatita bileto - emeritoj, studentoj, lernantoj).

Memoru, ke deviga antaŭpago por polaj esperantistoj estas 35,00 zł (sen tranokto) aŭ 80,00 zł (kun 1 tranokto) aŭ 125,00 zł (kun 2 tranoktoj) aŭ 170,00 zł (kun 3 tranoktoj).

Ekskursojn partoprenantoj pagos surloke.

Eksterlandaj esperantistoj sendas aliĝilon, kaj venas al Zabrze sen deviga antaŭpago kaj post alveno pagos sian partoprenkotizon surloke.

Se vi deziras por ke viaj datumoj estu laŭleĝe registritaj kaj zorgitaj bonvolu marku la ĝustan kvadraton en aliĝilo kaj subskribu ĝin.

La 27-an de majo 2018 (dimanĉo) je la 10-a horo en salono de MOSiR str. Jana Matejki 6 en Zabrze okazos ĝenerala kunveno de PEA-membroj.



Ĉefa Poŝtoŝicejo en Zabrze

## Vojaĝoj de niaj esperantistoj

Esperanto Klubo el Bielsko-Biała jam kvaran fojon organizis fotoekspozicion pri vojaĝoj de esperantistoj.

La 16-an de decembro 2017, okazis inaŭguro de la laŭvica ekspozicio. Dank'al la direktorino de la Kulturdomo „Włókniarz”, sinjorino Barbara Śliwińska-Jacyków, la malfermo aspektis tre solene kaj bele.

Ĉiuj bone scias, ke esperantistoj vojaĝas tra la tuta mondo. Same okazis en la jaro 2017 kaj fotoj de nia ekspozicio montris la plej interesajn aspektojn de tiuj vojaĝoj - de insuloj Lofotoj norde al Afriko al Koreio, ĉar multaj esperantistaj aranĝoj okazis en diversaj, tre interesaj partoj de la mondo.



La ĉijaran Universalan Kongreson oni organizis en la ĉefurbo de Suda Koreio - Seulo. Koreion ĉiuj konas pro tre alta vivnivelo kaj teknikaj atingoj - preskaŭ ekonomia miraklo, sed ankaŭ pro la respekto al historio,

antikvaĵoj kaj iamaj kutimoj. Krom tio, sudaj koreanoj ĉiam pensas kaj revas pri unuiĝo de du partoj de la lando - suda kaj norda. Fotoj pri tiu lando, montrantaj ĉiujn tiujn vivaspektojn, tre plaĉis al rigardantoj.

Alia interesa loko, montrata per niaj fotoj, estis Togo en Afriko, kie, en la jaro 2017, okazis Internacia Junulara Kongreso. Sur la fotoj videblas la ruĝan grundon, homojn, (ne tre riĉajn, laŭ nia vidpunkto eĉ tute malriĉaj, sed ridetemaj), la sanktajn arbojn sur bordo de la lago Togo. Ĉio aspektas tute alie ol tio, kion ni povas vidi ĉiutage ĉirkaŭ ni.

Fotoj, faritaj dum la eŭropaj vojaĝoj, ankaŭ estis tre interesaj kaj belaj. Ni povis vidi verdajn latviajn pejzaĝojn, belegan arkitekturon de Rigo, malnovajn suditalajn urbetojn kaj kiel kutime dum niaj ekspozicioj, belegajn pitoreskajn pejzaĝojn, fotitajn dum grimpado en altaj, rokaj skandinaviaj montoj.



Kelkaj personoj individue pilgrimis al Santiago di Compostella. Ili marŝis laŭ diversaj vojoj, sed al unu celo - Katedralo al Sankta Jakobo. Fotoj de tiu pilgrimado montras malnovajn ŝtonajn hispanajn urbetojn, montarajn vojetojn, signitajn per konko de la Sankta Jakobo, portugaliajn urbojn kaj pilgrimgastejojn.

Laŭ la opinio de niaj gastoj, tiu ekspozicio tre plaĉis al ĉiuj. Ni jam pensas pri la sekvonta, kiu - mi esperas - interese montros aliajn landojn, aliajn homojn kaj aliajn partojn de nia bela terglobo.

## Mojose

*Tobiasz Kubisiowski*

### PEJ-semajnfino en Varsovio

Ekde la 2-a ĝis la 4-a de marto 2018 en Varsovio daŭris la unua ĉi-jare PEJ-semajnfino. Ĉirkaŭ 15 junaj esperantistoj, loĝantaj en Pollando, kunvenis, por pasigi tempon kune en la Esperanta etoso.

La evento komenciĝis vendrede vespere, en la klubokafejo LOKO, ĉe la strato Smolna. Tie ni organizis lingvan kvizon, en kiu povis partopreni ĉiuj vizitantoj de la ejo. Post 30 demandoj, el kiuj kelkaj postulis scipovon

rekoni diversajn lingvojn, laŭ la donita teksto aŭ kanto, ĉiu el la gajninta grupo ricevis ekzempleron de papera versio de la kurso “Esperanto en dek lecionoj” de Paweł Wimmer, noveldonita, fare de Pola Esperanto-Asocio. Kompreneble, pluraj demandoj rilate al Esperanto, do nun la gajnintoj havas ŝancon pliprofundigi sian scion pri la lingvo.

La dua tago, sabato, estis plena de cerbumado kaj laboro, interalie pri la ĉi-jara jubileo - la 60-jariĝo de Pola Esperanto-Junularo kaj pri la venontaj eventoj, en kies organizo PEJ-anoj partoprenos. Tre fruktodona ankaŭ povas esti la grupa ateliero pri Junulara E-Semajno, kiu jarŝanĝe 2018/2019 okazos en Storkow, apud Berlino. Poste, la diskutoj daŭris, en malpli formala etoso, en alia klubokafejo.


Dum la fina tago, kiu estis dimanĉo, okazis ekskurso al Scienca Centro „Kopernik”. Temas pri la loko, kie per diversaj eksperimentoj, montrataj en tre facile kompreneblaj formoj, oni povas ekscii, kiel fizikaj, kemiaj aŭ eĉ sociologiaj procezoj influas nian vivon kaj kiel eblas utiligi ilin. La portempa ekspozicio, kiun ni havis okazon ĝui, temas pri aero. Por ĉiuj tre plaĉis la vizitita loko.

La sekva renkontiĝo, organizata de Pola Esperanto-Junularo, estas la Kunveno, kiu okazos de la 20-a ĝis la 22-a de aprilo 2018, en Lublin. Por pliaj informoj, sekvu nian retejon [pej.pl](http://pej.pl) kaj nian Facebook-paĝon!




Kelkaj el la partoprenantoj en la PEA kaj PEJ-siejo





Niaj prezidanto kaj kasisto ĝuas la viziton en Scienca Centro „Kopernik“.



La portempa ekspozicio pri aero en Scienca Centro „Kopernik“.

## Fotokonkurso por la jubilea jaro de PEJ

Pola Esperanto-Junularo anoncas novan fotokonkurson por PEJ-membroj (la nunaj kaj la iamaj!) kaj ĉiuj amikoj de PEJ, por festi la jubileon de 60 jaroj ekde la fondo de PEJ!

Festu kun ni! Sendu al ni viajn plej interesajn, gravajn, amuzajn kaj/aŭ kortuŝajn fotojn, kiuj montras momentojn el la historio de Pola Esperanto-Junularo – eventojn, kunsidojn, laboradon, diboĉadon ktp.

Ĝi povas esti historiaj nigraj-blankaj fotoj el viaj privataj arĥivoj\* aŭ ĵus elŝutitaj de saĝtelefonoj – gravas ke ili rilatu al la temo kaj estu ciferece disponebla en kiel eble plej bona kvalito.

Fotojn sendu al la adreso konkurso@pej.pl aŭ al la adreso Pola Esperanto-Junularo, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa, Pollando\*. La regularo troviĝas ĉe [www.pej.pl/eo/konkurso](http://www.pej.pl/eo/konkurso)


\*La fotojn, ricevitaj poŝte, ni skanos kaj resendos al la posedanto.

## Raportoj, rakontoj

*Andreo Bach*

### La homo, kiu savis historion

(la originalo de la teksto legeblas el la retejo: <https://reporters.pl/>)



En blankaj gantoj, uzante tranĉilon por papero, la patro Nadzib Michael zorge foliumas flaviĝintajn paĝojn de malnovaj volumoj kaj manuskriptoj, havantaj pli ol 1000 jarojn.

Rigardu, jen estas io unika. Estas malgranda “trezoro” - li montras ravita al ĵurnalistoj 17-jarcentan Biblion, skribitan en la

aramea, en la lingvo de Jesuo.

Estas unu el miloj da antikvaĵoj, kiujn tiu ĉi dominikano, riskante vivon, savis kontraŭ forbrulo de la barbaroj el ISIS, en 2014. La patro Nadžib tiam laboris en Kara Kusz – la plej granda aglomeraĵo de kristanoj en Irako. Kiam li ekkomprenis, ke la urbo ne defendos sin kontraŭ la islama atako, li decidis savi tion, kion li kapablis. Li sciis, ke la islamistoj senescepte detruas ĉiun antikvaĵon, kiun ili kaptos, opiniante ĝin idolkulto.

Ne nur religiajn librojn kristanajn, judajn, sed ankaŭ la arabajn de antaŭ la ekesto de Islamo kaj la antikvaĵojn de la antika arkitekturo.

Li decidis ne allasi, por ke la sama sorto renkontu milojn da malnovaj libroj. Jam pli frue, kiel la direktoro de la Centro de Manuskriptoj Orientaj, li



ĉiferecigis ĉi malnovajn librokolektojn, por ke la tuta homaro havu al ili vastan aliron. Nun li decidis savi la originalojn. 10 tagojn antaŭ la ISIS-invado, atendante nenies konsenton, nek ies komision, li kaŝis en kartonoj tiom da raraj

libroj, artobjektoj kaj antikvaĵoj, kiom li sukcesis kaj forveturigis ilin sub pripafado per kamiono al Irbilo, kunprenante ankaŭ la homojn, kiuj volis eskapi kun li.

Post la reakiro de Kara Kusz el la manoj de la Islama Ŝtato, la monako revenis la urbon kune kun siaj kunlaborantoj en novembro 2016, por rigardi, ĉu post la okupado de islamistoj restis io, kion li ne povis pli frue forveturigi.

„Kiam ni rigardis, kion ili tie faris, ni ekploris. Ili forbruligis ĉion. Ili definitive forbruligis nian historion. Estas terurege. Estas io komparebla al genocido” - konfesas la patro Nadžib. Tamen, la parto de la historio transdaŭris dank’ al li.

Multaj libroj estis skribitaj en la mortaj jam lingvoj – latine, aramee, otomane. Ili havas po pli ol kelkcent jarojn, la plej malnova – 1100. Estas ne nur tekstoj de kristanoj, sed ankaŭ de muzulmanoj, verkoj de malnovaj geografiistoj, astrologoj kaj historiistoj. „Ĉi kolektoj estas senprezaj. Ili estas la heredaĵo de la homaro” - substrekas la monako.

Nun la savitaj libroj estas kaŝitaj en unu el klostroj en Irako. La patro Nadžib petas ne malkaŝi en kiu, por ke la senditoj de ISIS kaj ordinaraj

rabistoj ne provu kupli la altprezan librokolekton. „Intertempe ni devas teni ĉi lokon en sekreto” - li avertas.

„La homaro elpensis du signifoplenajn aferojn en la mondo. La plej saĝan aferon – la libron kaj la plej stultan - la militon” - tekstas la vortoj de la pola pentristo kaj grafikisto Mieczysław Kotarbiński. La islama milito kontraŭ libroj estas ĝuste la milito de stulteco kontraŭ la homa saĝeco. Danke al Nadżib Michael, almenaŭ unu el la bataloj de la milito finiĝis per la venko. Danke al la homoj, tiaj kiel li, oni povas kredi, ke la mondo ankoraŭ ne freneziĝis.



## Vizitindaj lokoj

*Jan Szałowski*

El la pola tradukis: *Janusz S.*, Kanado

### Antaŭ 1000 jaroj ...

*Budyšin* (germane: *Bautzen*) estas la ĉefurbo de Supra Luzacio orienta regiono de Germanio, lokita nur 40 km de la rivero *Luzacia Niso*, laŭ kiu situas la pol-germana landlimo.



Panoramo de la urbo el ponto super la rivero Sprjewja (germane Spree)



Budyšin invitas



La fama soraba restoracio “Wjelbik” en Budyšin

Tiun urbeton mencias la historiaj dokumentoj jam en jaro 1002, ĉar tiam komenciĝis tie la serio de pol-germanaj militoj. Finis ilin la Budiŝina Packontrakto, kiun subskribis la reĝoj: de Pollando Boleslao la Brava kaj de Germanio - Henriko la 2a. Tio okazis precize antaŭ mil jaroj: la 30-an de januaro 1018, post kiam Luzacio restis en Pollando. Luzacion regis la pola reĝa Piast-dinastio ĝis kiam prus-brandenburgaj grafoj forprenis la nordan parton de tiu lando kaj saksaj grafoj – la sudan.



La Reĝo Boleslao la Brava kun roto de batalistoj – pentraĵo de M. Bylina

La tria slava regiono de *Mišno* (germane: *Meissen*;) restis jam antaŭe sub la germana regado. Rezulte, en la sekvontaj jarcentoj, same soraba lingvo, kiel kulturo de tiu nacio, fariĝis objekto de la sistema diskriminacio kaj subpremo.



Infana grupo en sorabaj popolvestoj. Ĉevaloj kaj apudvoja kruco en Luzacia vilaĝo

Komence de la 19-a jarcento, okazis multjara franc-germana milito kaj la soraboj havis eble iun esperon, ke en tiuj cirkonstancoj, la brutala germanigo ĉesos kaj Luzacio reakiros iom da libereco. Napoleon Bonaparte gvidis la francajn armeojn de venko al venko kaj tiam ankaŭ multaj poloj fervore lin apogis. Tiutempe Pollando estis forviŝita el la mapo de Eŭropo, ĉar dispartigis ĝin tri najbaraj ŝtatoj: Germanio, Aŭstrio kaj Rusio kaj poloj kredis ke, kun helpo de Francio, la lando estos liberigita de okupantoj. Pro tio, en jaro 1813, apud Budiŝin troviĝis ankaŭ pola kavaleria regimento, pri kio skribis oficiroj en siaj memornotoj.



Tomboj ĉe la preĝejo al s-ta Nikolao en Budiŝin

Urbodomo en Budiŝin

Baldaŭ poste, montriĝis ke nek soraboj, nek poloj realigos siajn revojn. Kiam Napoleono eniris Ruslandon, liajn armeojn venkis frostego kaj profundaj neĝoj, por kio la francoj ne estis preparitaj. Tiel finiĝis la Napoleona Epoko kaj nur kiam la germanoj estis venkitaj dum la unua

mondmilito, aperis novaj ŝancoj por libereco de la nacioj en la Meza kaj Suda Eŭropo.

La intermilita paco daŭris apenaŭ 20 jarojn kaj septembre 1939 germanoj komencis la duan mondmliton, dum kiu pli ol 70 milionoj perdis la vivon kaj kiu finiĝis post ses longaj jaroj. Brutalaj persekutoj kaj ekstermado de alinacianoj fariĝis tiam unu el la ĉefaj elementoj de la germana politiko. Inter multaj nacioj, ankaŭ soraboj estis tiam transigataj al germanaj koncentrejoj. Tiuj militkrimegoj daŭris ĝis jaro 1945. En tiujara aprilo, en la ĉirkaŭaĵo de Budiŝin, okazis sangaj bataloj inter la 2-a Pola Armeo kaj la hitleraj tank-taĉmentoj, ordonitaj lasi Ĉeĥoslovakion kaj direktiĝi norden por defendi Berlin. Hodiaŭ, en tiu loko troviĝas la granda monumento, memore al polaj soldatoj, kiuj mortis dum la budiŝinaj bataloj printempe 1945.



Monumento, omaĝe al poloj, mortintaj fine de la 2-a mondmlito. Meze (en blanka ĉemizo) staras s-no J. Szałowski, kiu verkis kaj ilustris ĉi tiun artikolon.

Post la 2-a mondmlito, tra Luzacio biciklis partoprenantoj de la biciklista *Vetkuro de Paco - Varsovio - Berlino - Prago*. Unu el la etapoj okazis en Chóšebuz (germane: *Cottbus*) – la kultura ĉefurbo de Malsupra Luzacio. Ĝis hodiaŭ, la soraboj de ambaŭ Luzaciaj regionoj montras fiere siajn popolvestojn dum diversaj festoj.

Luzacaj soraboj estas unu el kvar minoritatoj, agnoskitaj de la germana registaro. Multaj soraboj, precipe en Supra Luzacio, plue uzas sian gepatran lingvon. Tie oni ofte vidas dulingvajn strat-nomojn. Loĝantoj de la norda Luzacio estas pliparte luteranoj kaj en Supra Luzacio ekzistas katolikaj komunumoj kun la ĉefa dekanejo en Budiŝin. Ankaŭ tie ekzistas virina monaĥejo, sola en la tuta regiono de Saksujo. Nun mi prezentas al vi fot-raportaĵon pri Budiŝin, la urbo konstruita ĉe la rivero: *Sprjewja*; (germane: *Spree*). Ni ankaŭ vizitis la ĉirkaŭaĵojn nord-okcidente de la urbo kio estas fakte koro de tiu plej malgranda slava nacio en la mondo. Soraboj estas fakte la unusola nacio inter la okcidentaj slavo, kiu postvivis la plurjarcentan germanigadon.



La vilaĝo Chróścicy kaj multlingva afiŝo pri muzikfestivalo

Ĉiun duan jaron en Luzacio okazas Internacia Folkloro Festivalo (IFF) – la plej granda kultur-evento organizata de tiu nacio. Precipe grava festivalo estos organizota okaze de la 1000-jara jubileo de la Budiŝina Packontrakto. Certe valoras ĝin partopreni!



## Pri kio ni aŭdas

*Adam Wilkus*

### Konsiloj por bona sano

Estimata Redakcio,

jen kelkaj konsiloj pri bona sano, kiujn mi kaj miaj amikoj sukcese utiligas kaj kiuj povas helpi ankaŭ al la legantoj de Pola Esperantisto.

Naturo provizas nin je multaj kuraciloj utilaj por nia sano. Inter ili estas mielo, kompreneble nur tiu natura produktata de abeloj, kaj cinamo.

En PE 1/2015 oni publikis interesan tekston de Roman Schodnicki pri mielo el abelejo en Beskidy-montaro. Mielo estas vere bongusta donaco de naturo, kiun mi preferas ekzemple dolĉigante teon. Sciindas, ke **miksaĵo de mielo kaj cinamo** helpas saniĝi aŭ mildigi la simptomojn de malsano. Sciencistoj rekomendas ĝin kiel tre efikan rimedon. La kanada ĉiusemajna gazeto “World News” publikigis rezultojn de la sciencesplorado pri tiu miksaĵo:



- *Kormalsano*

Miksu mielon kun cinamo kaj ŝmiru ĝin sur pano anstataŭ marmelado. Manĝu ĝin regule por matenmanĝo. Miksaĵo de mielo kaj cinamo reduktas kolesterolon en la sango kaj sangaj vaskuloj. Ĝi protektas pacientojn kontraŭ koratako. Restarigas elastecon al sangaj vaskuloj, vejnoj kaj arterioj.

- *Artrito*

Matene kaj vespere, trinku tason da varma akvo kun 2 kuleretoj da mielo kaj 1 kulereto da cinamo. Ili mildigas kronikajn simptomojn de artrito.

- *Infektoj de urina veziko*

Miksu 2 kulerojn da mielo kaj 2 kuleretojn da cinamo en glaso da varmeta akvo kaj fortrinku ĝin. Danke al tio vi subpremos infekton de la urina sistemo kaj veziko.

- *Dentdoloro*

Miksu kuleron da cinamo kun 5 kuleroj da mielo. Apliku 3 foje por sur doloranta dento kaj la doloro malaperos.

- *Kolesterolo*

2 kuleroj da mielo kaj 3 kuleretoj da cinamo miksitaj kun 2 decilitroj da varma akvo reduktos la kolesterolon ĝis 10 procentoj dum 2 horoj. Nura mielo, se uzata ĉiutage, ĉesas kreskadon de kolesterolo.

- *Malvarmumoj*

Uzu 3 foje tage kuleron da mielo kun kvarono da kulereto da cinamo dum 3 tagoj. Vi forigos malvarmumon, kronikan tuson kaj purigos la bronkojn.

- *Problemoj kun la stomako*

Mielo kaj cinamo sukcese kuracas stomakdolorojn kaj protektas ĝin de la formado de ulceroj. Krome, kulereto da cinamo kaj 2 kuleroj da mielo aplikataj antaŭ manĝo protektas kontraŭ pliigo de stomaka acideco.

- *Pligrandiĝo de ventro kaŭze de troaj gastrikaj gasoj en la intestoj*

Mielo kaj cinamo malhelpas la formadon de nenecesaj gasoj dum digesto.

- *Problemoj de imuna sistemo*

Ĉiutaga mielo-ingestaĵo subtenas blankajn globulojn en sia lukto kontraŭ virusoj kaj bakterioj.

- *Gripo*

Mielo enhavas naturajn substancojn, kiuj mortigas virusojn de gripo

- *Malsanoj de maljunaĝo*

Regula trinkado de teo kun mielo kaj cinamo malhelpas problemojn de

maljunaĝo (teo: 4 kuleroj da mielo, 1 kulero da cinamo, 3 tasoj da akvo). Trinku kvaronon da taso tri foje ĉiutage. Danke al tio vi havos vian haŭton freŝan kaj molan ĝis maljuna aĝo.

- *Akneo*

Miksu 3 kulerojn da mielo kaj unu kulereto da cinamo, tiel ĝi fariĝos kremo. Ĉiutage antaŭ enlitiĝo metu la miksaĵon sur la inflamaj fokuso (matene vi povas facile lavi ĝin per varma akvo). Akneo malaperos dum unu semajno.

- *Infekto de haŭto*

Aplikante mielon kaj cinamon al malsanaj lokoj oni kuracigos la ekzemon, la zosteron kaj ĉiajn haŭtajn infektojn.

- *Obezeco*

Ĉiumatene, duonhore antaŭ matenmanĝo, kaj vespere, antaŭ dormado, trinku kalikon da mielo kun aldonita cinamo. Danke al tio vi perdos pezon. La miksaĵo malhelpas deponadon de graso.

- *Kancero*

Pacientoj suferantaj de osta, stomaka kaj intestina kancero devus uzi miksaĵon de kulero da mielo kaj kulero da cinamo 3 foje tage dum la tuta monato.

- *Kronika lacigo*

Maljunuloj, uzantaj mielon kaj cinamon en proporcio 1: 1 havas pli da energio kaj estas pli fortaj.

- *Odoro el buŝo*

La matena gargarado de gorĝo per varma akvo kun mielo kaj cinamo (po unu kulero) vi certigos freŝan spiron dum la tuta tago.

Oni pruvis, ke manĝado de mielo en iuj dozoj ne havas negativan efikon por diabetikoj. Do, multaj povas profiti. Kompreneble, en la kazo de seriozaj malsanoj, konsilu kuraciston.

Uzu tiun miraklan miksaĵon de mielo kaj cinamo kaj restu sana!

---

*Wiesław Stanicki*

## Esperanto en la “Universitato de la tria aĝo”

En la lastaj jardekoj rimarkinde pligrandiĝis la averaĝa longeco de la homa vivo en multaj landoj de la mondo. Pligrandiĝis la nombro da homoj en la postproduktema aĝo. Multaj plejaĝuloj estas daŭre lertaj kaj ili

malŝatas senfare sidi en siaj loĝejoj, ili bezonas pretekston por eliri el la domo. Unu el la rimedoj de la aktivigado de maljunaj homoj estas universitatoj de la tria aĝo, kiuj donas eblecojn por plivastigi sciadon, instigas socian aktivadon por la bono de homoj, plifaciligas interamikigon, certigas eblecon zorgi pri la homa fortikeco.

Estas granda interesiĝo pri lernado de fremdaj lingvoj, precipe la anglan, germanan kaj eĉ hispanan. Bedaŭrinde ellerno de iu ajn fremda lingvo postulas multe da tempo, penado, energio kaj pacienco. El praktika vidpunkto la plej bona solvo estus elekto de la angla lingvo, sed kiam ne devigas nin neceso kaj ni lernas por plezuro kaj kontentiĝo pro uzebleco de alia lingvo krom la gepatra, do bonega solvo estas lernado de Esperanto. Oni scias, ke scipovo de Esperanto treege plifaciligas la lernadon de aliaj fremdaj lingvoj, tion pruvis multaj esploroj en lernejoj de kelkaj landoj.

Kiamaniere volontigi plejaĝulojn por la eklerno de Esperanto? Antaŭ ĉio oni devas transdoni informojn pri la lingvo, ĝia kreinto, ktp., sed la plej grava afero estas argumenti pro kio indas ekkoni la lingvon kaj kiajn profitojn oni povus akiri pro tio:

1. La homo en nuntempa mondo devas koni fremdajn lingvojn (ju pli multe des pli bone). Esperanto estas unu lingvo pli.

2. Kiel facila lingvo ĝi povas esti ellernita per malgranda klopodo kaj en mallonga tempo. Videblaj progresoj en la lernado donas ĝojon kaj motivigas al plua lernado.

3. La lernado de Esperanto estas granda intelekta aventuro, samtempe plezuro kaj distraĵo. La kreinto de la lingvo L. Zamenhof estis genio kaj kreis grandiozan verkon. Ni admiras elstarajn verkojn literaturajn, muzikajn, pentrartajn, ktp., ĉar respegulas en ili la genio de la kreintoj. Simile estas rilate al Esperanto.

4. La kono de Esperanto pliriĉigas nian vortprovizon – ĉiuj internaciaj vortoj troviĝas en Esperanto.

5. Esperanto estas logika lingvo, lernante kaj uzante ĝin ni plibonigas nian logikan pensmanieron kaj esprimadon de la pensoj. Grandegaj eblecoj krei novajn vortojn pere de afiksoj kaj kunligado de la radikoj permesas kreeme uzi la lingvon. Distraĵo ne malpli bona ol krucvortenigmoj, ŝaradoj aŭ aliaj cerbumludoj.

6. Esperanto havas vastan kaj multflankan aplikadon: **korespondado** (papera poŝto kaj retpoŝto), **literaturo** (originala kaj tradukaĵoj), **gazetaro** (pli ol cent titoloj en diversaj landoj), **radio** (regulaj disaŭdigoj, inter aliaj Varsovio, Havano, Vatikano), **interreto** (filmoj, lingvaj kursoj, Vikipedio kaj aliaj), **scienco** (sciencaj revuoj, studoj pri kaj en Esperanto), **organizoj**

(landaj esperantistaj asocioj, fakaj organizoj), **religio** (religiaj revuoj, mesoj en Esperanto), **turismo** (grandegaj ebloj de veturado kaj vizitado, malmultekostaj aŭ senpagaj tranoktejoj – „pasporta servo”).

7. Senperaj kontaktoj dum multaj esperantaj aranĝoj kaj reciprokaj vizitoj, ofte tutajn grupojn de esperantistoj.

8. La kreinto de Esperanto estis polo naskita en Bjalistoko kaj poste loĝanta en Varsovio, ni devus esti fieraj pro tio.

9. Grandioza ŝatokupo, kiu donas eblecon teni diversajn kontaktojn kun amikoj en la tuta mondo.

10. Esperantistoj estas progresemaj homoj, kiuj rompas anakronisman stereotipon, ke oni devas lerni multajn lingvojn kaj malgraŭ tio havi malfacilaĵojn en komunikado kun homoj de diversaj nacioj. Ja estas tiel simpla solvo: **UNU FACILA LINGVO KAJ ĈIU KOMPRENAS ĈIUN!**

La lingvo Esperanto estas populara precipe inter pliaĝuloj en la tuta mondo. Kiel ekzemplo mi citas fragmenton de la letero, kiun skribis instruistino de Esperanto el Aŭstralio: „... *Mi instruas grupon de plimaturuloj; estas 9 personoj en la klaso por progresantoj kaj 12 en la klaso por komencantoj. Plej el la grupo havas pli ol 60 jarojn kaj ni estas emeritoj. Kvankam ni estas maljunuloj, tamen ni havas junajn korojn kaj mensojn. Esperanto igas nin junaj!...* ”

Kiel bona ekzemplo de funkciado de Esperanto en la kadro de Universitato de la Tria Aĝo estas Kulturdomo en Łochów, malgranda urbo apud Varsovio. La unuan paŝon faris Wojciech Laskowski, esperantisto kaj instruisto de historio en la loka liceo, kiu proponis, ke al la programo de la universitato oni aldonu instruadon de Esperanto kaj direktoro de la kulturdomo Artur Lis akceptis la proponon. Sekve dum la solena inaŭguro de la nova lernoĵaro inaŭguran lecionon „La angla kaj Esperanto: konsideroj pri la estonteco” prelegis Wiesław Stanicki, licea instruisto de fiziko kaj esperantisto. Krom la plejaĝulo la lecionon elaŭskultis invititaj gastoj, inter aliaj urbestro de Łochów Robert Gołaszewski. La temo vekis interesiĝon ĉar sekvatage al la Esperanta kurso venis dekelkaj personoj kaj en la sekva semajno alvenis novaj lernemuloj, kvankam iuj el ili ne estis decidemaj pri la lernado, gvidis ilin scivolemo. La lecionoj okazis per la metodo de dialogoj, ili estas mallongaj dialogoj kun interŝanĝiloj kaj de la unua leciono ĉiu partoprenanto interparolis kun aliaj partoprenantoj laŭ aranĝitaj ŝablonoj, kiujn ili ricevis antaŭe, la gramatiko estis limigita ĝis necesega minimumo. Intertempe aperadis demandoj pri la manieroj uzi la konon de Esperanto kaj aliaj duboj; al tio akompanis agrabla kaj gaja etoso kun kafo kaj teo.

Certe iuj partoprenantoj rezignos kaj ĉesos la lernadon de Esperanto, ĝi estas normala fenomeno, sed iuj estas tre sciavidaj kaj ili certe atingos la finon de la kurso.

## Homoj

Redaktis: *Zbigniew Kornicki*

### Pri Paweł Janowczyk

Paweł estis fiero de sia familio kaj amikoj. Li estis familiema homo - bonega filo, frato, edzo kaj patro. Post morto de sia patro, li ĉiam klopodis helpi sian patrinon kaj zorgeme okupiĝis pri la pli junaj gefratoj. Ĝis la morto li estis piliero de la tuta familio, kiun li amegis, lia forpaso estas neimagebla ŝoko por la familianoj.

Paweł devenis de simpla kaj modesta familio, sed dum la tuta sia vivo li pene kaj honeste laboris. Li studis politologion en Poznań kaj en Varsovio. Poste, la amo por libroj puŝis lin krei librovendejon, kiun li gvidis kun sia edzino Oksana kaj tiamaniere li povis vivteni sian familion. La laboro estis multfoje malfacilega kaj dum la sezono de vendado de lernolibroj postulis de ili ĉiutage multhoran fortostreĉon.

Jam kiel liceano, Paweł eklernis la internacian lingvon Esperanto, kiu iĝis por li



grava ŝatokupo, al kiu li dediĉis sian tutan plenkreskulan vivon. Dank'al Esperanto, li ne nur konatiĝis kun sia edzino, sed ankaŭ li trovis multajn geamikojn kaj konatulojn en la tuta mondo. Dank'al sia nekutima organiza talento kaj aktiveco, li akiris rimarkeblan estimon inter esperantistoj kaj organizitaj de li E-aranĝoj atingis grandan renomon. Ni notu nur du inter ili:

Unue, en 1987, Paweł estis kunorganizanto kaj kunprojektanto de la Jubilea 43-a IJK de TEJO, organizita en Krakovo, okaze de la 100-a datreveno de naskiĝo de Esperanto. En tiu, la plej granda ĝis nun, IJK partoprenis 1100 personoj el 62 landoj. Kiel vere modesta homo, Paweł neniam fanfaronis pri la distingo, kiujn li poste ricevis.

Due, li estis kunkreinto de la grava, larĝe konata kulturaranĝo: Artaj Konfrontoj en Esperanto - ARKONES, kiun li subtenis kadre de Junulara E-Movado kaj poste, laborante en Varsovio, kiel Ĝenerala Sekretario de Pola Esperanto-Asocio. Post sia reveno al Poznań, meze de la 90-aj jaroj, li revivigis la aranĝon kaj kontribuis al ĝia brila disvolviĝo. Netaksebla estas tiukampe lia merito - ja tiu arta kaj kultura festivalo iĝis unu el la plej valoraj Esperanto-aranĝoj en Eŭropo.

Paweł ne verkis librojn, ne prezentiĝis sur scenejo, sed dank'al li, multaj komencantaj aŭtoroj, kantistoj kaj aktoroj, post la prezentiĝo dum ARKONES, akiris fortan motivon daŭrigi esperantlingvan verkadon.

Paweł estis multflanke edukita homo, malfermita al bezonoj de aliaj kaj helpema laŭ siaj fortoj kaj povoj. Li estis nekomparebla amiko kaj, antaŭ ĉio, li estis bona homo.

Paweł! Vi ege mankos al ni ĉiuj.

Ripozu en paco!



Paweł Janowczyk kaj  
Zbigniew Kornicki -  
ARKONES 2015

## La – bazaj reguloj – parto 1

La vorteton *la* oni nomas **difina artikolo**. Ĝi montras, ke oni parolas pri **certa afero konata de la alparolato**. Tia konateco povas tamen esti tre diversspeca.

Oni ne aldonas finaĵojn al *la*. Ĝia formo ne varias, ĉu la frazparto estas unu-nombra, ĉu multe-nombra, ĉu la frazparto havas N-finaĵon, ĉu mankas N-finaĵo:

- *la domo* = *tiu de vi konata domo*
- *la bela junulino* = *tiu de vi konata bela junulino*
- *la domo kun bela pordo* = *tiu de vi konata domo kun bela pordo*
- *la junulinoj* = *tiuj de vi konataj junulinoj*
- *la altaj montoj* = *tiuj de vi konataj altaj montoj*
- *la domoj kun bela pordo* = *tiuj de vi konataj domoj kun bela pordo*
- *la ruĝajn kraĵonojn* = *tiujn de vi konatajn ruĝajn kraĵonojn*

Oni povas en iaj okazoj uzi la mallongigitan apostrofan formon *l'*.

*La* staras antaŭ aliaj priskriboj de la O-vorto. Eventualan rolvorteton oni metas antaŭ *la*:

- en **la** domo
- ĉe **la** bela junulino
- pri **la** altaj domoj
- super **la** domoj kun belaj fenestroj

Ne diru do *\*en tuta la mondo\**, sed *en la tuta mondo*. Ne diru: *\*Li ronkis tutan la nokton.\** Sed: *Li ronkis la tutan nokton.*

Tamen en iuj specialaj nomesperimoj, precipe de reĝoj kaj aliaj altranguloj, oni tradicie metas *la* post la O-vorto antaŭ A-vorta priskribo:

- Karolo **la** Kvina
- Luizo **la** Dek-kvara
- Vilhelmo **la** Silentema
- Timuro **la** Lama

Oni povas diri, ke en tiaj okazoj temas pri du frazpartoj. La unua estas la propra nomo, kaj la dua estas mallongigita apudmeto: *Karolo, la kvina reĝo kun tiu nomo / Luizo, la dek-kvara reĝo kun tiu nomo / Vilhelmo, la silentema reĝo / Timuro, la lama sultano.*

En poezio oni ofte uzas *la* en nenormalaj manieroj. Oni ekz. metas A-vortojn antaŭ *la*, aŭ uzas *la* kune kun poseda pronomo. Tia nenormala uzo povas iafaje esti arta, sed oni ne tro malproksimiĝu de la ordinaraj reguloj.

En la *Fundamenta Gramatiko* estas skribite, ke personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas tute ĝin ne uzi. Tiu permeso validas nur por komencantoj.

### Malpermesoj de *la*

En kelkaj okazoj simplaj reguloj malpermesas *la*:

- Ne uzu *la* ĉe frazparto, kiu havas **alian difinilon**. Aliaj difiniloj estas la **posedaj pronomoj**, la **tabelvortoj je U, A** kaj **ES**, la vorteto ***ambaŭ***, kaj **duondifina unu**:

- *Mia dorso doloras.* Ne: *\*La mia dorso doloras.\**
- *Tiu domo estas granda.* Ne: *\*La tiu domo estas granda.\**
- *Ĉiuj gastoj jam venis.* Ne: *\*Ĉiuj la gastoj jam venis.\**
- *Mi ŝatas ĉiajn legomojn.* Ne: *\*Mi ŝatas la ĉiajn legomojn.\**
- *Kies gasto mi estas, ties feston mi festas.* Ne: *\*La kies gasto...*

*la ties festo...\**

- *Mi legis ambaŭ librojn.* Ne: *\*Mi legis la ambaŭ librojn.\**

- Ne uzu *la* ĉe vorto, kiu per si mem estas propra nomo:

- *Pasintjare mi vojaĝis al Kanado.* Ne diru: *\*...al la Kanado.\**

- *Kie estas Francisko?* Ne diru: *\*Kie estas la Francisko?\**

Sed ĉe ordinaraj vortoj, kiuj fariĝis propraj nomoj, oni normale ja uzas *la*.

- Ne uzu *la* ĉe la frazrolo **alvoko**:

- *Kelnero, alportu al mi glason da biero!* Ne diru: *\*La kelnero,*

### Individuaĵo aŭ speco

La uzo de *la* tre dependas de tio, ĉu oni parolas pri certa individuaĵo, aŭ oni parolas ĝenerale pri speco.





## La eŭska miraklo

Scientistoj ofte studis ĝin kaj ankoraŭ ne povas determini, de kie ĝi venas. La eŭska lingvo - la lingvo, parolata de la eŭskia komunumo, estas enigmo por lingvistoj, ĉar ĝi ne similas al iu ajn alia lingvo. Ĝin nuntempe uzas nur 35% de la eŭska loĝantaro, ĉar ĝi preskaŭ tute malaperis; batalis kontraŭ ĝi la hispana diktatoro - generalo Francisco Franco. Dum lia regado de 1939 ĝis 1975, li malpermesis uzadon de la eŭska lingvo kaj devigis eŭskojn uzi la hispanan. La instruistino Karmele Errekatoxo memoras ĉi tiun tempon. Dum sia infanaĝo, ŝi scipovis paroli nur en la eŭska, kiu travivis en urboj kaj vilaĝoj, troviĝantaj for de la ĉefaj centroj. Ŝi ekkonis hispanajn vortojn en unua klaso de fundamenta lernejo, kaj tiam ŝi plej suferis pro la diskriminacio de la eŭska lingvo. En la sesdekaj jaroj, ŝi komencis ĉeesti sekretajn lecionojn de la eŭska. La lernado okazis en la preĝeja kelo en Bilbao. Tiaj lokoj ekzistis ekde 1944, kiam grupo de gepatroj fondis la unuan sekretan lernejon. - *La eŭska lingvo estis degradigita. Eblis uzi ĝin nur en la intima, hejma spaco. Sed en la urboj eĉ muroj ŝajnis aŭskulti* - diras Karmele. Iutage, iu denunciis, ke ŝia avino, loĝanta en la malgranda urbo Bermeo, parolas en la eŭska al vendistoj sur la foirplaco. La avino estis arestita, enfermita en malliberejo kaj devigita pagi monpunon. Antaŭ liberigo liberejgardistoj razis ŝian kapon. La humiligita virino ĉesis uzi sian denaskan lingvon por ĉiam. Tamen, malgraŭ la subpremo, la eŭska vivas ĝis hodiaŭ.

*Ĝi estas la eŭska miraklo, diris la lingvisto Koldo Mitxelena. - Estas vere miraklo, ke ĝi travivis sen literaturo, sen edukitaj homoj. Uzata dum miloj da jaroj, skribe ĝi aperis nur en la libro, publikigita en la franca urbo Bordeaux, en 1545; la unua eŭska lernejo estis malfermita en 1914, en San Sebastian. La eŭska estas la lingvo de la naturo. Ĝi havas imponan gamon de esprimoj, priskribantaj pejzaĝojn, bestojn kaj plantojn. Gi havas preskaŭ cent vortojn por nomi la papilion. Iuj tamen diras, ke ĝi estas la terorisma slango. Ĝi estis kompromitita fare de ETA, kiu uzadis la eŭskan en leteroj, enhavantaj minacojn de morto kaj devigojn pagi elaĉetmonon. La membroj de ĉi tiu*



separisma organizaĵo kaj iliaj simpatiantoj skribis ankaŭ, en la eŭska, sloganojn sur muroj.

*Ĝi estis uzita kiel armilo, politikigita kaj manipulita* - diras Karmele. - Ekzistas konvinko, ke ĝi apartenas al naciistoj, sed mi kredas, ke la lingvo estas universala.

---

La artikolo venas de la revuo *Angora*, esperantigita kaj publikigita laŭ telefona interkonsento de la redakcioj de *Angora* kaj *Pola Esperantisto*

## Literaturaĵoj

En la PE 6/2017 ekaperis informo pri la internacia, poezia konkurso "Ĉe la rivero Vistulo", kiun organizis, en la jaro 2017, esperantistoj en Toruń, okaze de la festita en nia lando "Jaro de Vistulo". En la konkurso partoprenis 9 aŭtoroj, el 5 landoj, kiuj sendis 18 poeziaĵojn. Nun ni prezentas 2 inter la premiitaj: Urszula Tupajka el Pollando "Vistulo mia" kaj Ewa Grochowska el Francio, "Neforgesebla Rivero"

*Ewa Grochowska*

### Neforgesebla rivero

En Beskidoj vi, ja, naskiĝas  
El fadenoj-ĝemelinoj  
Sed plufuante plifortiĝas,  
Maron atingas, Reĝino.

Vi fluas ĉiam atestante  
Pri gravaj popoleventoj.  
Poloj mencias vin kantante  
Pri epopeaj momentoj.

En vi, post la morto de Krakoo,  
Dronis Vando necedema.  
Vian akvon trinkis drako,  
La besto homvorema.

En vi speguliĝas plu Vavel',  
Antaŭa reĝa sidejo,

La pompa varsovia kastel',  
La ĉervinska abatejo.

Apud vi vivis fama homo,  
Mondkonata klerulo,  
Koperniko - astronomo.  
Fieru pri li, Vistulo!

Al vi konfidencis genia  
Ludoviko - esperulo  
Pri sia lingvo internacia.  
Ne forgesu lin, Vistulo!

Plurfoje, triste vi rigardis  
La morton de ribeluloj,  
Kiujn mortigis malamikoj  
Ĉe via bordo, Vistulo!

Post milito ĝoje vi ondis  
Kiam sindona popolo  
Ĉefurbon rapide refondis,  
Portis ĝin al l'monda gloro.

Nebule revenas rememor',  
Ĉar vin vidis mi, etulo.  
Sed vi plufluas en mia kor'  
Per patraj vortoj, Vistulo.

*Urszula Tupajka*

## Vistulo mia!

River' lazura, ni ĉe via bord' eksidis,  
Konfesojn varme flustritaj de mia amant'  
Per laŭta akvoplaŭdo vi tute surdigis  
Kaj forpuŝis la ĉarmon de l'romantika kant'.

Inter arbustoj kaj arboj, jam dum jarcentoj,  
Vi muĝas la rakonton pri nia histori',  
Pri ĝiaj feliĉaj kaj tragikaj momentoj,  
Protektante kutimojn plej gravaj por ni!

Kore vi brakumis, saltintojn pro vivtimo  
En vian fluon, kaj adiaŭe ĉiujn kisis  
Muĝante: "estu trankvila via animo  
Se l'mond' viajn larmojn ne kapablis forviŝi".

La tempo same, kiel vi, rapide fluis  
Super via ŝanelo marŝis nigraj nuboj  
Ĉe bord' ridet' knabina de longe ne bruis,  
Nur hurlis terurige la kanonaj tuboj.

Se vi povus paroli, ne muĝi kolere,  
Kiam akvo ruĝiĝis, dum la miltventoj  
Multon al ni klarigi povus vi ja vere  
Pri nia Patrujo dum longaj jarcentoj



Vistulo apud Toruń

### Ni Esperantistoj...

Dum mia esperantista vivo, pli ol 20- jara, mi partoprenis en diversaj E-aranĝoj - ekde junularaj renkontiĝoj ĝis Universalaj Kongresoj. Dume mi observadis multajn esperantistojn kaj ilajn kondutojn kaj mi rimarkis, ke inter esperantistoj estas pli da stranguloj ol en aliaj medioj. Eble esti esperantisto jam estas strangeco?

Bedaŭrinde, iuj kondutoj ne estas akcepteblaj. Ofte esperantisto ne zorgas pri sia aspekto kaj vestaĵo, kiu ne taŭgas en diversaj situacioj. Ekzemple, dum la solena malferno aŭ fermo de UK, multaj estas vestitaj en sporta vestaĵo: t-ĉemizo kaj ŝorto, kiu kelkfoje estas malpura kaj ĉifita. Imagu, ke dum aliaj, neesperantistaj kongresoj aŭ konferencoj, partoprenantoj alvenas tiel vestitaj. Tio ne okazas alie, nur dum E-aranĝoj. Mi ne volas diri, ke ni devas esti vestitaj tre oficiale, ĉar ni estas en amikeca rondo, sed ni metu dignan kaj taŭgan vestaĵon.

Alia ekzemplo: Dum via vivo, vi certe kelkfoje estis en filharmonio, operejo, teatro - antaŭ spektakloj oni petas ne foti, ne filmi aŭ registri la spektaklon. Tio estas normale, ke spektantoj respektas tiun peton. Sed tion ne faras esperantistoj dum E-aranĝoj, kvankam ofte okazas profesiaj spektakloj en profesiaj teatroj aŭ operejoj, ktp. Mi demandas KIAL? Kial multaj filmas aŭ fotas per siaj saĝtelefonoj kaj malhelpas artistojn kaj aliajn spektantojn. Sufiĉe ofte tiuj fotoj aŭ filmoj havas neniun valoron, ĉar estas faritaj en malbonaj kondiĉoj. Ĉu vere esperantistoj ne povas konduki en tiaj institucioj kiel "normalaj homoj"?

Ni faru ĉion, por ke ni esperantistoj ne estu rigardataj kiel stranguloj, sed kiel normalaj, inteligentaj homoj, kun kiuj valoras kunlabori. Bedaŭrinde, la supre priskribitaj kazoj malhelpas pozitivan aspekton de nia movado.

Partoprenantoj de  
unua Universala  
Kongreso en  
Boulogne sur Mer





*Magdalena Tatara*

### Venu al Esperantaj Tagoj de Krakovo

**31-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo** okazos la 1-an - 3-an de junio 2018 en Kulturcentro de Podgórze (Centrum Kultury Podgórze), strato Sokolska 13 en Krakovo, <http://www.ckpodgorza.pl>

Kiel kutime bunta kaj interesa programo. Aliĝkotizo 15 zł pagota surloke, tranoktado kaj manĝado memzorge. Eblas aliĝi per KSE-retejo: <http://www.kse.cba.pl/aligxilo/>

Tranokteblecoj: vidu [www.kse.cba.pl/tranokteblecoj/](http://www.kse.cba.pl/tranokteblecoj/). Jen la plej proksimaj trunktejoj: junulara Gastejo (tre proksime) <http://www.sokolska.spanie.pl>, <http://www.ssm.com.pl/krakow-sokolska/>, ul. Sokolska 17, tel. +48 12 345 57 85, Gastĉambroj: <http://www.korona.krakow.pl/pokoje/>, ul. Kalwaryjska 9-15, tel./fakso: 12 656 15 66, Hotelo "Kajzer", <http://www.kajzer-hostel-pl.book.direct/pl-pl>, ul. Limanowskiego 12.

Eblas trovi multajn aliajn tranokteblecojn pere: [www.kse.cba.pl/tranokteblecoj/](http://www.kse.cba.pl/tranokteblecoj/)

Eblas ankoraŭ anonci vian kontribuon al programo de KTdE. Kontakto: [kse.krakovo@gmail.com](mailto:kse.krakovo@gmail.com) - Krakova Societo Esperanto.



**PEA Szczecin, Venu printempe al nordokcidenta Pollando!**

Saluton al homoj, kiuj ŝatas vagabondi. Ni, esperantistoj el Szczecin, invitas vin partopreni en la printempa renkontiĝo en nia urbo. Ĝi okazos la 20-an - 22-an de aprilo 2018. Nia teamo planas komenci la aranĝon jam la 18-an kaj fini ĝin la 23-an de aprilo, por pli bone konatiĝi kun la urbo kaj la regiono. Estu kun ni.



**Przemysław Wierzbowski, La urbo Bjalistoko helpos eldoni Esperantlingvan libron.**

La urbestro de Bjalistoko Tadeusz Truskolaski prezentis la rezulton de la konkurso por realigi kulturajn projektojn okaze de la 100-a datreveno de sendependiĝo de Pollando. Bjalistoka Esperanto-Societo ricevis

monsubtenon, por la unua eldono de la romano "Antaŭprintempo" de Stefan Žeromski en Esperanto.

La libro estos prezentata kaj senpage disdonata dum la 19-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en decembro, tamen jam la 14-an de oktobro, okaze de la naskiĝtago de Žeromski, ni organizos renkontiĝon dediĉitan al la verko kaj ĝia aŭtoro. La tradukon al Esperanto faras Tomasz Chmielik.

Pliaj informoj: <https://espero.bialystok.pl/eo/antauprintempo-en-esperanto/>



*Stanisław Mandrak*, Jam 40 jarojn esperantistoj ripozas en Mileno.

Rapide pasas jaroj kaj jen, jam 40-an fojon, ni renkontiĝos dum Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno. Multaj el Vi havis jam okazon veni junie al Mielno. Multaj kelkfoje. Tiujn, kiuj volas veni la unuan fojon kaj tiujn, kiuj volas rememori sian restadon ĉe la Balta Maro, ni invitas al komuna ĝuado de la specifa etoso de la konata en Pollando ripozloko dum la amika, esperantista renkontiĝo. La aranĝo okazos ĉijare la 12-23-an de junio. Invitu ankaŭ viajn konatojn kaj amikojn, por kune travivi neforgeseblajn momentojn kun esperantistoj kaj inter esperantistoj. Ni atendas vian partoprenon kaj vian kontribuon al la programo de la jubilea, jam la 40-a „esperantista printempo”.



*Dominique Baron*, Poŝtkarta vidigo de nia tutmondeco - se vi reagos!

Mi nomiĝas Dominique Baron kaj loĝas en Tours, Francio. Mi instruas Esperanton en la kolegio, ene de la Instituto Notre-Dame La Riche al 4 junaj knaboj. 3 havas 11 jarojn kaj 1 havas 13 jarojn. Ili estas komencantoj. Vidu foton. Por ke ili sciu, ke Esperanto estas vere internacia, mi petas vin, se vi bonvolas, sendi al ili postkarton de via lando. Tiamaniere, ankaŭ la tuta Instituto scios pri Esperanto.



Institution Notre Dame La Riche, à l'attention de Dominique BARON,  
30 rue Delperier, BP 5813, FR-37058 Tours Cedex 1, Francio



## Renato Corsetti, Itala Esperanta kongreso

Vi certe ne legis la paĝon <http://kongreso.esperanto.it/85/ekskursoj.htm> en la paĝaro de la Kongreso de Esperanto en Italujo, okazonta en San Marino de la 18-a ĝis la 25-a de aŭgusto 2018. Se vi estus leginta ĝin, vi sciis, ke San Leo estas la plej bela vilaĝo de Italujo.

Tion ne diras ni sed fakaj fakuloj. Aparta ekskurso portos vin tien, kie vi povos promeni tra ĝiaj stratetoj kaj viziti la nekonkereblan fortikaĵon de la 15-a jarcento. Sed San Leo estas nur unu el la ekskursoj. Vi povos ankaŭ travivi viziton al la urbo de Raffaello (jes, tiu de la Vatikanaj Muzeoj), Urbino, kaj survoje viziti pogrande katedralojn, kastelojn kaj renesancajn pentraĵojn.

Kaj se vi ankoraŭ volas viziti ion, jen San Marino mem en sia mezepoka gloro. Ne hazarde Unesko deklaris ĝin "Havaĵo de la homaro". La plej antikva respubliko de la mondo kapablis adapti siajn antikvajn strukturojn por ke ili funkciu ankoraŭ nuntempe. Certe ne plu estas arbalestistoj, sed la Granda kaj Ĝenerala Konsilantaro estas la nuna Parlamento kaj la "regantaj kapitanoj" estas duoblaj ŝtatestroj, kiuj oficas nur dum 6 monatoj kaj apartenas al malsamaj partioj, por ke unu kontrolu la alian.

Sed eble vi enuas pro ĉiuj ĉi tiuj mezepokaĵoj kaj preferas la vere antikvan historion. Bone. Bonvolu partopreni la viziton al Ravenna, la urbo de la mozaikoj, kun vizito de la monumentoj de la epoko de Romo, kiel la Maŭzoleo de Galla Placidia (5-a jc.) la Baptejo de la Ortodoksuloj (5-a jc.) sekvata de vizito de la plej karaj lokoj por la ostrogota reĝo Teodoriko, lia fama Maŭzoleo, baziliko de sant'Apollinare Nuovo, la Baptejo de la Ariani (fine de la 5-a – komence de la 6-a jc.), ĝis la mirindaĵoj de la bizanca epoko kiel la baziliko de San Vitale kaj Sant'Apollinare in Classe (6-a jc.). Vi ankaŭ rajtos simple iri al la adriatika marbordo kaj bani vin. Ni helpos vin per ekskursoj kun tiu celo.

Simple iru al la paĝo <http://kongreso.esperanto.it/85/modulo.htm> kaj komencu bani vin en historion per aliĝo. Ni atendas vin. La LKK

## Kalendaro - 2017

28.12. 2017 - 4.01. 2018	Junulara Esperanta Semajno JES - 2017 en Szczecin	Pola Esperanto-Junularo <a href="http://www.pej.pl">www.pej.pl</a> <a href="http://jes.pej.pl/2016/">http://jes.pej.pl/2016/</a>
18-23.04. 2018	Esperanta Printempo en Szczecin	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Szczecin. <a href="mailto:lobacz.k@onet.eu">lobacz.k@onet.eu</a>

19-20.05. 2018	Sesa Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj en Wrocław	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado en Wrocław, informado.eo@gmail.com
19-25.05. 2018	70-a IFEF Kongreso en Wrocław	Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio Silezia Esperanto-Asocio <a href="https://ifef.wroclavo.damj.es/">https://ifef.wroclavo.damj.es/</a>
26-28.05. 2018	37-a Pola Esperanto-Kongreso en Zabrze	Estraro de Pola Esperanto-Asocio estraro@esperanto.pl
1-3.06 2018	31-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo en Kulturcentro Podgórze (Centrum Kultury Podgórze), str. Sokolska 13 en Krakovo, <a href="http://www.ckpodgorza.pl">http://www.ckpodgorza.pl</a>	Krakova Societo Esperanto kse.krakovo@gmail.com <a href="http://www.kse.cba.pl/aligxilo/">http://www.kse.cba.pl/aligxilo/</a>
9.06. 2018	Esperanto-stando dum 22-a Scienca Pikniko en Varsovio ĉe Nacia Stadiono „PGE Narodowy”	Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio alvamo@wp.pl
17.06. 2018	Montara Renkonto sur Ĉantorio la Granda en Beskidy Montaro	suchanekj@seznam.cz
12-23.06. 2018	40-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Gliwice stanislaw.mandrak@gmail.com
2-4.08. 2017	Esperanta stando dum PolAndRock Festival - en Kostrzyn ĉe la rivero Odra. Renkontiĝo por memzorgantoj ene de la granda rokmuzikfestivalo	Halina Komar halinakomar@gmail.com
1-9.09. 2018	51-a Internacia Esperanta Feriado en Łądek Zdrój	Silezia Esperanto Asocio Teresa Pomorska, pomer@wp.pl
7-9.09. 2018	Esperanto Sur la Strando - 2018 Gdynia – Sopot. Temo: „Nia m/s „Zamenhof”	Triurba Esperantista Asocio TORENTO torentosopot@wp.pl <a href="https://sites.google.com/site/esperantowsopocie/">https://sites.google.com/site/esperantowsopocie/</a> FB – esperantowsopocie.pl
21-23.09. 2018	34-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto „Arkones 2018” en Poznań	E-SENCO Kultur-Socia Societo je la nomo Ludoviko Zamenhof en Poznań. <a href="http://www.arkones.org/eo/">http://www.arkones.org/eo/</a>
28.12-4.01 2019	10-a JES Junulara Esperanta Semajno en Hirŝluĥ (Storkow-Mark) apud Berlino.	Pola Esperanto-Junularo <a href="http://www.pej.pl">www.pej.pl</a> , <a href="http://jes.pej.pl/2016/">http://jes.pej.pl/2016/</a>



# Oni eldonis

Anstataŭ priskribo de nova esperantigva eldonaĵo, kiu fakte ne aperis komence de 2018, ni volas prezenti al vi interesan recenzon pri jam anoncita en *Pola Esperantisto* libro de Roman Dobrzyński „Zamenhof en Varsovio”. Valoras ankaŭ aldoni, ke Bjalistoka Centro de Ludoviko Zamenhof preparas duan polingvan eldonon de la libro kaj samtempe preparas eldonon en la angla. Tiuj decidoj montras, ke la libro plenumas la nunan socian kaj politikan interesigon.

La suba recenzo aperis pollingve en la revuo „Kronika Warszawy”, n-ro 2 (156), 2017, p.158

Redakcio

*Bożena Wierzbicka*

Tradukis *Robert Kamiński*

## Recenzo de la libro „Zamenhof en Varsovio”<sup>1</sup>

En 2017 pasis la centa datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof (1859-1917). Kvankam naskiĝinta en Bjalistoko, li pasis en Varsovio la plej longan parton de sia vivo – 44 jarojn. *Doktoro Esperanto*, edukito de la varsovia Dua Filologia Gimnazio ĉe la Novolipki-strato, diplomito de la Imperiestra Varsovia Universitato, praktikinto de la juda hospitalo ĉe la Inflancka-strato angule de la Pokorna-strato, okulisto, akceptanta pacientojn en sia kabineto ĉe la Dzika-strato – estis intelektulo, kies pasio ekde la junaĝo fariĝis *Lingvo Internacia*. Li estis kreinto de la artefarita lingvo Esperanto. Roman Dobrzyński, aŭtoro de la recenzata ĉi tie libro, ne konsentas kun tiu ĉi difino. Li konsideras, ke Esperanto neadekvate nomata artefarita lingvo, estas fakte lingvo planita. Oni povas kompari ĝin kun rivero, kiu post ĝia reguligo faciligas navigadon, sed ne ĉesas esti rivero.

---

1 Roman Dobrzyński, *Zamenhof w Warszawie*, wyd. 1, Polski Związek Esperantystów, Warszawa 2017, ISBN 978-83-908340-2-3, wybór bibliografii, indeks topograficzno-osobowy, mapa dzielnicy Muranów w Warszawie z oznaczeniami obiektów omawianych w książce opracowane przez Roberta Kamińskiego. Publikacja mogła się ukazać dzięki wsparciu finansowemu Narodowego Instytutu Dziedzictwa.

Laŭ lia opinio tiu ĉi lingvo „entenas idealan proporcion inter sia natura lingva materialo kaj la gramatika strukturo racie ordigita”.

Roman Dobrzyński – juristo, ĵurnalisto, filmisto, mondvojaĝanto kaj verkisto – estas entuziasma esperantisto, ekde 2005 honora membro de Universala Esperanto-Asocio. Li estas aŭtoro de multnombraj publikaĵoj pri Esperanto kaj en Esperanto. Lia libro *La Zamenhof-strato*, eldonita en Pollando en 2001, jam aperis en 15 lingvoj, lastatempe en la hispana, okaze de la 100-a datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof.<sup>2</sup> Tiu ĉi libro estas verkita surbaze de interparoloj de la aŭtoro kun Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof, la nepo de la kreinto de Esperanto; ĝia temo estas la lingvo kaj la sorto de la familio Zamenhof.

Zamenhof – kandidato al la paca Nobel-premio en 1913 – ne estas por averaĝa civitano rekonebla. Li apartenas al tiuj merituloj, kiuj akiris pli multe da adeptoj eksterlande ol en sia patrujo. Tio ne signifas, ke en nia lando oni ne agnoskas liajn atingojn kaj valorojn. Tamen, la konscio pri lia merito kaj agnosko de lia verko havas, ĝenerale, historian dimension. Ekde 2015 – danke al la decido de Ministerio pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo-Esperanto troviĝas sur Pollanda Listo de Nemateriaj Kulturheredaĵoj.

La recenzata libro estas konceptita de la aŭtoro kiel gvidilo laŭ la spuroj de Zamenhof en Varsovio. La aŭtoro proponas 5 itinerojn (1. Zamenhofa Muranovo, 2. Juda Tombejo, 3. Tomboj de Zamenhof-familianoj, 4. La Zamenhof-strato, 5. Oazo de Ĉiuj Sanktuloj.) La libro finiĝas per ĉapitro pri la muzeo POLIN, kaj postparolo. La libron riĉigas multaj nigra-blankaj fotoj, indekso topografia-persona kaj mapo de la kvartalo Muranovo, sur kiu oni indikas koncernajn objektojn kaj priskribojn.


En la komenco de sia gvidlibro, la aŭtoro konsciigas al leganto, ke la materia Muranovo de la antaŭmilita periodo ne ekzistas, ĉar la germanaj invadintoj transformis ĝin en rubejon dum la dua mondmilito. Por precize fiksi priskribitajn lokojn, necesas konsulti mapojn, serĉi fontojn pri tiama Varsovio kaj engaĝi sian imagopovon. Gvidante la leganton en la Zamenhofa urbo, la aŭtoro penetras pasintecon, kaj skizas historion de judoj en Varsovio. Li intencas montri, kia estis tiu ĉi urbo – laŭ la juda vidpunkto – al kiu la familio Zamenhof venis el Bjalistoko. La aŭtoro rememorigas, kiel

---

2 R. Dobrzyński, *La Calle Zamenhof. Libro escrito segun conversaciones mantenidas con Dr. L.C. Zaleski-Zamenhof*, trad. de esperanto al hispana De J.M. Garcia Ituriz, J.M. Rodriguez Hernandez, A. Arquillos Lopez, editora Riopedras Ediciones, Certeza, Zaragoza, 2017, pp. 355.

malkohera estis la juda medio en Varsovio laŭ ideologia, religia, kultura kaj socia vidpunktoj; kiel en tiu ĉi mozaiko troviĝis sin Ludoviko Zamenhof.

Li estis idealisto, revanta pri la paca frateco de popoloj kaj la sorto destinis lin vivi en la tempo de leviĝanta antisemitismo. La konscio pri tiu ĉi fakto ne lasis lin eĉ dum atingado de internaciaj sukcesoj. Tial li deklaris al la profesoro de Jagelona Universitato Odo Bujvid, kiu en 1912 organizis en Krakovo Universalan Kongreson de Esperanto, kiam li demandis, kiel prezenti lin al la kongresanoj: „Vi povas nomi min filo de la pola tero, (ĉar neniu povas nei, ke la tero, en kiu kuŝas ambaŭ miaj gepatroj kaj sur kiu mi konstante laboras kaj intencas labori ĝis la morto, estas mia patrujo), sed ne nomu min polo, por ke oni ne diru, ke mi – por akcepti honorojn – metas maskon de la popolo, al kiu mi ne apartenas.”



Kiel intelektulo li estis adepto de sia pozitivisma epoko. Li konsideris, ke la fundamento de edukado devas esti laboro kaj scio, ĉerpita el esplorado de faktoj, alireblaj por la homa menso. Li estis sciencisto, agnoskanta liberalismon kaj utilismon. Tamen, samtempe oni povas lin nomi – laŭ la difino lanĉita de Julian Krzyżanowski – novromantikulo, kion konfirmas lia idealisma koncepto reordigi la mondon. Por tiu ideo li ne trovis sufiĉan apogon.

La libro de Roman Dobrzyński estas verko plurelementa. Ĝi kunigas informojn pri la tuta Zamenhof-familio, pri ĝiaj spuroj, ne nur varsoviaj; prezentas perturbojn de la kreado kaj posta

enkonduko de Esperanto kaj de ĝia disvastigado. Krome, la libro entenas revuon de „mejloŝtonaj” malkovroj de Zamenhof, koncerne la ideon de internacia lingvo kaj referencas al la historio de ĝiaj projektoj. La aŭtoro mencias la komplikan sorton de la varsovia inteligentularo, kaj reliefas la

lokon de Esperanto – la sukcesinta lingvo internacia kaj ties aŭtoro en la kultura pejzaĝo de Pollando kaj Eŭropo. En la enhavo de la libro, oftaj estas interesaj aludoj al la poliglotaĵoj de preskaŭ tuta familio Zamenhof, laŭ profesio medicinistoj, sed samtempe homoj de larĝa horizonto; ankaŭ aktivuloj en la Esperanto-movado. Multnombraj rimarkoj, larĝigantaj pli fruajn pensfadenojn kaj digresiojn, permesas konsideri tiun ĉi libron kiel unu el portretoj de la intelekta Varsovio en la fino de la 19-a kaj komenco de la 20-a jarcentoj, la plurkultura urbo, kiu ne plu ekzistas.

## Nia fotogalerio

### Junulara Esperanto-Semajno JES - 2017 en Szczecin








La sepan de februaro, eŭropa volontulo de BES Marc festis la 100-an datrevenon de sendependiĝo de Litovio kun esperantistoj en Vilno.



Kazuhiro Kida, ĵurnalisto de la japana gazeto *Nikkei*, preparas serion de artikoloj pri la estonteco de lingvoj en la cifereca epoko. El Tokio al Bjalistoko li venis speciale por unu tago por informiĝi pri Esperanto.





Spotkanie poświęcone autorowi języka międzynarodowego w setną rocznicę śmierci i 130. rocznicę istnienia Esperanto

## LUDWIK ZAMENHOF twórca języka międzynarodowego Esperanto

W programie:

- monodram Mario Migliuciego "Doktoro Esperanto" o życiu i twórczości L. Zamenhofa, w tłumaczeniu na język polski Romana Dobrzyńskiego - wykona Helena Biskup,



- wystawa książek i czasopism esperanckich

**1 grudnia 2017, godz. 17.00**

Książnica Pomorska w Szczecinie  
AULA, wejście od ul. Podgórznej, III p.



Szczecin - renkontiĝo kaj spektaklo pri L. Zamenhof okaze de lia 100-a mortdatreveno



# NIA FOTOGALERIO 18-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj

